Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo) エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Eseo pri Jokohamo

Vjetnama manĝejo apud “Icho-Danchi”

NAMBA Fumiharu

Iutage antaŭtagmeze, mi subite sentis deziron gustumi ekzotikajn kuiraĵojn, kaj rememoris pri vjetnamaj manĝejoj najbare de “Icho-Danchi”（いちょう団地）, en distrikto Izumi-Ku, Jokohamo.

“Icho-Danchi” estas unu el la grandaj publikaj apartamento-kvartaloj (“Icho” signifas “ginko”, kaj “Danchi” signifas “publika apartamento-kvartalo”). La Danchi malfermiĝis je 1971, kaj iom post iom eksterlandaj loĝantoj multiĝis. Nun pli ol 20% loĝantoj en la Danchi estas eksterlandanoj el diversaj (pli ol 20) landoj. Precipe, vjetnamaj loĝantoj multe vivas jam longe. Pro tio, apud la kvartalo troviĝas kelkaj vjetnamaj restoracioj ĉefe por la loĝantoj. Onidire, la kuiraĵoj vjetnamaj estas vere bongustaj kaj aŭtentikaj kiel en Vjetnamio.

Pro tio ke la areo de urbo Jokohamo estas tre vasta, de mia aŭto-parkejo al “Icho-Danchi” ambaŭ en Jokohamo, estas pli ol 15 kilometrojn malproksime, kaj bezonas pli ol 30 minutojn per mia aŭto. Je 11a horo mi atingis la plej faman manĝejon “THANH HA” (タン・ハー). La konstruaĵo estas tute simpla, kaj situas tuj apud la apartamentoj malnovaj.

En la manĝejo, troviĝas grandaj tabloj por manĝado kaj butikŝrankoj por produktoj el Vjetnamio, kvazaŭ malgranda vjetnama superbazaro kaj restoracio kunfandiĝis en unu konstruaĵo. Rigardinte dikan menulibron, mi mendis nudelaĵon kun viandoj, legomoj kaj printempaj rulaĵoj “Bún thịt chả giò” (ブンティットチャージョー). Krome, en la butikŝranko trovinte, mi aĉetis dolĉan trinkaĵon “Mirinda”.

Ja, en Esperantujo “Mirinda” estas tre fama pro tiu nomo deveninta de Esperanto. Iamatempe oni produktis kaj vendis ankaŭ en Japanio, sed nun oni ne vendas oficiale. En Vjetnamio eĉ nun ekzistas “Mirinda” abunde. Oni importas kaj vendas ĉi tie por vjetnamanoj kiel kutiman trinkaĵon.

La nudelaĵo “Bún thịt chả giò” estis vere bongusta kun ekzotikaj kompleksaj spicoj, odoroj, kaj gustoj. La trinkaĵo “Mirinda” vjetnama estis tro dolĉa kun gusto de krema sodakvo, tial ne tre harmoniis kun la nudelaĵo. Sed tiu tagmanĝo estis tute impresa por mi. Mi volas denove veni ĉi tiun manĝejon “THANH HA” kaj provi aliajn diversajn kuiraĵojn el Vjetnamio.

Post la manĝado, mi plu aĉetis 6 trinkaĵojn “Mirinda” por donacoj al la Esperanto-Muzeo.

(junio 2025)

Esperanto Jokohama

■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si,
Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)
■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)

eĥo el Svisujo

Kun ĝojo mi ricevadas vian revuon “Novaĵoj Tamtamas”.

En tiu numero mi kortuŝita revidis la longan tablon de la domo en Yatsugatake, kie mi pasigis multajn tre agrablajn tagojn.

Mi revidis gesinjorojn Doi, ĉe kiuj mi povis tranokti plurfoje. La foto estas tre bela kaj esprimas lian seriozan staron kaj ŝian atentemon (la klinita kapo indikas tion).

Plie mi legis pri Koizumi Jakumo, pro kiu ni vizitis Matsue jam en 1985, mia edzo, miaj du filinoj kaj mi. En vojaĝo kun Hori Yasuo en la jaro 2009 ni reiris tien kaj retrovis la saman hotelon, kie ni povis ĝui la sunsubiron de la sepa etaĝo. La urba vizito sekvis la spurojn de la irlanddevena verkisto ĝisfunde japanigita. Mi antaŭĝojas relegi “Kwaidan” en esperanto.

Kaj finfine mia buŝo memoris la tre ŝatatan guston de angilo, *unagi*.

La foto kaj teksto de mia amiko Joël Muhire el DR Kongo ĝojigis min ankaŭ.

Koran dankon pro tiu agrabla momento kun via revuo.

Gratulojn al la esperantistoj el Yokohama, kiuj tenas tiun revuon viva.

Elkore Mirejo

eĥo el Aŭstralio

Koran dankon pro la sendado de plua numero de Novaĵoj Tamtamas.

Antaŭe mi povis kapti angilojn en la rivereto antaŭ mia domo, sed nun ne plu. Mi pensis ke la kialo estis ke la loka registaro decidis “purigi” la rivereton kaj ne plu estas ŝtipoj por sin kaŝi. Sed post rigardo de dokumentfilmo la problemo estas pli kompleksa. Laŭ mia kompreno angiloj devas longe vojaĝi por sin reprodukti kaj pro niaj vivmanieroj la medio fariĝas pli kaj pli malfavora al angiloj.

Amike, Franciska Toubale

EL NIA MUZEO

Jen la kongresa memoraĵo de la 59a Japana Esperanto-Kongreso (1972) en urbo Takamatu. Kredeble la sola okazo, ke alumetujo fariĝis oficiala memoraĵo.

sezonvorto septembra

Okita Kazumi

Aŭskultado de insektoj 虫聞き

La kutimo ĝui la kantadon de aŭtunaj insektoj.

Dum la Edo-epoko (1603-1868), ĝi estis konsiderata unu el la “Kvin rafinitaj ĝuoj de la popolanoj”, kune kun ĝuoj por florvido, neĝvido, lunvido kaj krizantemvido.

Tiutempe, lokoj kiel la lago Shinobazu en Ueno, Tokio estis konataj kiel bonaj lokoj por aŭskulti insektojn, kaj multaj homoj vizitis ilin kun pajlmatoj kaj sakeo.

Kial ne sekvi la ekzemplon de niaj antaŭuloj kaj pasigi longajn aŭtunajn noktojn aŭskultante la melodiojn de insektoj?